


La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 7/1982 ★ 6,50



Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★
Telefon: 08 - 11 74 34 ★
EsperantoCentro är öppet måndag
— torsdag kl. 17 — 19 ★ **Postgiro:**
20 12-3, Esperantoförbundet ★
Medlemsavgift: direktansluten
medlem 50 kr, ungdomsmedlem
under 26 år 25 kr, familjemedlem
(utan tidning) 15 kr ★
Prenumerationsavgift för *La Espero*
ingår i medlemsavgiften ★
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet SEJUs
blad *ktp.*

La Espero

Organ för Svenska
Esperantoförbundet ★ **Adress:**
EsperantoCentro, Brunnsgatan 21,
11138 Stockholm ★ **Ansvarig
utgivare:** Bertil Åkerberg ★
Redaktör: Franko Luin,
Mygdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
telefon hem 08-712 82 91 ★
Prenumeration: 50 kr per år,
postgiro 20 12-3,
Esperantoförbundet ★ Tidningen
utkommer med åtta nummer per år
★ **Fotosats och tryck:**
EsperantoCentro, Stockholm 1982

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö
★ **Besöksadress:** Möllevångsgatan
20 B ★ **Öppettider:** 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17
— 18 ★ Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även under
sommaren ★ **Telefon:** 040-12 20 29
★ **Postgiro:** 578-5 ★ **Expedition:**
Wivi Nilsson ★ **Styrelsens
ordförande:** Anita Lindblom


OBS! OBS! OBS!

Prenumerationspriset
för *La Espero* under
1983 är 65 kronor.
Om du redan betalt
1982 års pris, vill
du vara snäll och
skicka till oss
mellanskillnaden?
Tack!

Nun homoj loĝas ĉe Esperantogatan

Ĉiuj, kiuj partoprenis la svedan
jarkongreson en Malmö en 1981,
memoras, ke la urba estraro
decidis nomi la ĉefstraton en
nova loĝkvartalo "Esperantoga-
tan". La jarkongresa ekskurso eĉ
celis tiun antaŭurban parton (kie
tiam nur kampoj estis) kaj admira-
radon de la provizora nomoŝil-
do.

Nu, nun la situacio estas sufiĉe
alia. Sur la iamaj kampoj jam
staras novaj loĝdomoj kaj
"Esperantogatan" ricevis sian
definitivan ŝildon (certe estos
pluraj). Sed pli ol tio: la aŭtobusa
linio 36D ricevis sian finstacion
ĝuste ĉe "Esperantogatan", tiel
ke la nomo esperanto videblas
ankaŭ sur la haltejaj ŝildoj survo-
je al la finstacio (bedaŭrinde tio
ne estas bone videbla sur la bildo
kun la aŭtobuso). Kiel vi povas
kompreni, la esperantistoj en
Malmö sufiĉe fieras pri ĉi tiuj
senpagaj "anonctabuloj".



ISSN 0014-0694
DECEMBRO 1982
70-A JARKOLEKTO
FONDITA EN 1913

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

INNEHÅLL/ENHAVO

78/Nun homoj loĝas ĉe Esperantogatan
79/Det är språket som är viktigast
80/Språkpriset till Lennart Åberg
81/TEMO: La homo
81/kelkaj ĉapitroj pri la homa korpo
85/Tabulo
86/SEJU-paĝo
87/JES&NE
88/Eesperantonytt



Det är språket som är viktigast

Nästa år, 1983, är av FN döpt till "internationella året för kommunikation" och Internationella Teleunionen har fått i uppdrag att planera de särskilda aktiviteterna som krävs. Genom valet av ITU kommer de tekniska kommunikationernas utveckling att betonas starkt. Ändå måste språket betraktas som det viktigaste av alla kommunikationsmedel. Frågan om ett internationellt språk bör därför få en framträdande roll under kommunikationsåret.

Esperantoförbundet planerar olika aktiviteter under 1983 för att rikta myndigheternas och allmänhetens uppmärksamhet på att språket är människans viktigaste kommunikationsmedel. En upptaktsträff kommer att äga rum den 29 januari, där fyra framstående svenskar kommer att bidra med var sin inledning. **Erik Ransemar**, författare, kommer att tala om *Kommunikation sett ur konstnärlig skapande synpunkt*; **Åke Sandin**, lärare och f.d. ordförande i Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen, kommer att tala om *Fred, u-land,*

språk; **Christer Kiselman**, professor, kommer att tala om *Vad är ett världsspråk*; **Ingemar Nordin**, rektor, kommer att representera SEF på upptaktsmötet och tala om *Esperanto och skolan*.

"Fred — en fråga om kommunikation" blir temat för en veckoslutskonferens i Bredsand nära Stockholm, som Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund arrangerar under våren.

Esperantoförbundets tidning *La Espero* utkommer i mars med ett specialnummer om kommunikation, i stor upplaga. Detta nummer ges ut tillsammans med Norges Esperantoförbund.

Ungdomsgruppen "La Rane-toj" från Stockholm kommer att ordna torgmöten i Stockholms förorter på lördagar under våren.

12 — 15 maj kommer Esperantoförbundet att ha sin årliga kongress i Gävle. Även vid detta tillfälle kommer kommunikationsåret och frågan om språket som det viktigaste kommunikationsmedlet att dominera aktiviteterna.

Språkpriset till Lennart Åberg

Vart tredje år delar Stockholms Fredsförening ut något som heter Josefina Larssons språkpris. Tolv gånger tidigare har priset delats ut, alla gånger till personer som arbetat för utbredning av esperanto. Den 15 december i år gick priset åter till en esperantist — denna gång Lennart Åberg från Göteborg.

I *Fredsföreningens skrifter och meddelanden* nr 7 för 1982 motiveras valet av Lennart Åberg med följande ord:

"Han har varit aktiv inom esperantorörelsen i 50 år och tillhört Svenska Esperantoförbundets styrelse i flera perioder, ett par omgångar som vice ordförande.

Lennart Åberg har genomfört många föreläsningsturneer och vid dessa anlitat personer från över 40 språkområden, varigenom informationer om förhållandena i olika delar av världen kunnat förmedlas till åhörarna. Han har besökt folkhögskolor och gymnasier, ordnat med utställningar och hållit många kurser i esperanto. I all denna verksamhet har han sökt lägga in upplysning om fredsarbetet, om u-ländernas problem och om FNs verksamhet.

Lennart Åberg har även varit aktiv inom Svenska Freds. Tidigare då han var bosatt i Skövde, bildade han där en lokalavdelning av Svenska Freds och var ordförande i denna. Han är dessutom ledamot av Sveriges Världsfederalisters styrelse och verksam inom FN-förbundet."

Lennart Åberg fick sitt pris den 15 december vid ett möte med ett femtiotal deltagare, varav flera esperantister. ;

Josefina Larssons språkpris

"Josefina Larssons språkpris" är en av Stockholms Fredsförenings fonder. Josefina Larsson var en av föreningens medlemmar, en av de tysta, ja kanske en av de okända, de som inte syns utåt.

För att nå målet och låta fonden få sådan omfattning att

den kunde bli till nytta, var Josefina Larsson under sina sista år mycket sparsam, ja rent av sträng mot sig själv. Någon har berättat att hon ibland till och med led nöd hellre än att ta av de medel hon bestämt skulle bilda fondkapitalet.

Josefina Larsson dog i slutet av 1939. Åke Hammarlund, föreningens dåvarande kassör, hade tidigare haft korrespondens med Josefina Larsson och därigenom fått veta att Stockholms Fredsförening var omnämnd i hennes testamente.

Åke Hammarlund tog kontakt med vederbörande myndigheter och fick besked om att någon släkting inte kunnat anträffas. Tillsammans med föreningens ordförande fick han i uppdrag att ordna jordfästning mm. Några av Stockholms Fredsförenings medlemmar samlades vid hennes bår i samband med jordfäst

ingen.

När Josefina Larssons papper gick igenom fann man hennes testamente. Hon förklarade där som sin sista vilja, att hennes kvarlåtenskap skulle överlämnas till Stockholms Fredsförening, som skulle förvalta medlen och vart tredje år dela ut avkastningen som ett pris. Priset skall gå till en person som särskilt lagt sig vinn om att utbreda ett världsspråk, som kan ha utsikt att vinna insteg som läroämne i den civiliserade världens skolor.

Josefina Larsson var i sin krafts dagar anställd hos Aron Norlin, vilken varit i tjänst hos familjen Nobel. Norlin ihågkom fredsarbetet i sitt testamente och bland sina donationer kan Stockholms Fredsförening uppta hans fredsfond.

Alfred Nobel är ju känd av alla. Han ville inte bara främja framåtskridandet på vetenskapens område, en del av hans donation gick till ett fredspris. Bland dem som fängslades av Alfred Nobels idé var Aron Norlin och i sin tur hans husföreståndarinna, Josefina Larsson. Josefina Larssons donation har alltså en direkt förbindelse med Alfred Nobel och hans fredspris.



Kelkaj ĉapitroj pri la homa korpo

La homa korpo estas ofte komparata kun subtila maŝino. Same kiel maŝino ĝi estas ankaŭ provizita de multe da ekipaĵoj, nomataj organoj, kun difinitaj formoj kaj funkcioj. Ĉiu organo okupas difinitan lokon en nia korpo, posedas difinitan strukturon el difinitaj materialoj nomataj teksturoj aŭ histoj, kiuj konsistas el multege da ĉeloj, mikroskope malgrandaj korpecoj por ĉiu histo propraj, kaj iliaj produktaĵoj.

LA ORGANOJ KAJ LA ORGANSISTEMOJ

La organoj, kiuj ekipas nian korpon, estas laŭ iliaj funkcioj klasifikataj en jenaj grupoj aŭ sistemoj:

1) La sistemo de la movado, plue dividata en skeleta kaj muskola sistemoj, kiuj kune funkcias por subteni kaj laŭvole movi nian korpon kaj ĝiajn partojn.

2) La sistemo de la digestado kaj spirado, aŭ intesta sistemo, tiel nomata, ĉar la organoj de tiu ĉi sistemo devenas kune de la primitiva intesta tubo al ili komuna.

3) La sistemo de la urinado kaj generado, aŭ la urogenera sistemo.

4) La sistemo de l'interna sekreciado, aŭ la endokrina sistemo, aro da organoj, kiuj produktas substancojn al ili specialajn, la hormonojn, kaj sendas ilin en la sangocirkuladon, por ĥemie reguligi la funkcion harmonion de la korpo.


5) La sistemo de la cirkulado aŭ la angia sistemo, kiu mastrumas la cirkuladon de sango kaj limfo. La t.n. sangofarajn histojn kaj organojn (ostomedolo, limfonodoj, lieno k.a.) oni ankaŭ alkalkulas al tiu ĉi sistemo.

6) La sistemo de la sentado, aŭ la receptora sistemo, al kiu apartenas la aparatoj de gustado, flarado, vidado, aŭdado kaj ekvilibro. La haŭto kun siaj apartenaĵoj estas ankaŭ alkalkulata al tiu ĉi sistemo.

7) La nerva sistemo, kiu kunli-

gas ĉiujn organojn en la korpo al harmonie funkcia unuo, la organismo. Nia vivproceso estas tial ordigata kaj reguligata en duobla maniero, t.e. unuflanke ĥemie per la endokrina sistemo kaj aliflanke organisme per la nerva sistemo.

TEMO



LA HOMA KORPO

La homa korpo estas ekstere dividebla en trunko kaj ambaŭ membroparoj, la supra kaj la malsupra, la trunko plue en kapo, kolo kaj torso. Ĉe la kapo oni apartigas verdon, okcipiton, frunton, ambaŭ tempiojn kun oreloj kaj vizaĝon kun ambaŭ okuloj, nazo, buŝo, vangoj kaj mentono. La malantaŭa parto de la kolo estas nomata nuko. La torso estas plue dividebla en brusto kun ambaŭ mamoj, ventro kaj umbiliko, sola postsigno de la patrino, kaj pelvo. La malantaŭaj partoj de la brusto kaj ventro estas respektive nomataj dorso kaj lumbo; la malsupra parto de la ventro rekte super la femuro, ingveno. Al la pelvo apartenas ambaŭ sidvangoj (gluteoj) kaj perineo, kie troviĝas pubparto aŭ pudendo kaj anuso.

La supran membron oni dividas en ŝultron, akselon, superbrakon, kubuton, antaŭbrakon kaj manon kun polmo kaj 5 fingroj: dika (polekso), montra, meza, ringa kaj maldika; la malsupran membron en kokson, femuron, genuon, kruron kaj piedon kun plando kaj 5 piedfingroj: dika (halukso), 2a, 3a, 4a kaj 5a aŭ maldika. La malantaŭaj partoj de la genuo, kruro kaj piedo estas respektive nomataj poplito, suro (tibikarno) kaj kalkano.

LA SEKSA DIFERENCO

Ĉiu individuo montras krom la seksaj organoj diversajn akcesorajn karakterizaĵojn kunigitajn kun la sekso, kiuj kune donas al la korpo virecan aŭ virinecan aspekton. Ili estas pli-malpli klare rimarkeblaj ĉe preskaŭ ĉiuj partoj de la korpo, precipe distinge tamen en la barbokresko kaj pliforta disvolviĝo de la voĉorgano ĉe la viroj, kaj tiu de la mamoj kaj la pelvo ĉe la virinoj.

LA AGA KLASIFIKO

Ĉiu individuo montras al sia korpo aĝajn karakterizaĵojn. Oni kutime dividas homojn en jenajn aĝoklasojn:

1) Infaneco, ekde la naskiĝo ĝis la pubereco; suĉinfano oni nomas infaneton ĝis la ekapero de la unua laktodento.

2) Juneco, ĝis la fino de la statura kreskado. Dum la seksa maturiĝo okazas diversaj ŝanĝoj en nia korpo: ekapero de pub-

haroj kaj akselharoj ĉe ambaŭ seksoj, ekapero de barbo kaj voĉoŝanĝo ĉe knaboj kun figuro karakteriza al la forta sekso, kaj ekapero de menstruo (menarko) kaj forta disvolviĝo de mamoj kaj pelvo ĉe knabinoj kun figuro karakteriza al la bela sekso.

3) Plenaĝo, ĝis la ekapero de l'unua signo de la maljuniĝo.

4) Matureco, ĝis la ekapero de la kadukaj fenomenoj.

5) Maljuneco, ĝis la fiziologia morto. La maljuneco montras sin krom multe da ĝeneralaj kadukaj signoj per ekapero de grizaj haroj, maldensiĝo de hararo sur kapo (ĝis kalviĝo ĉe viroj) kaj en akseloj, elfalo de unuopaj dentoj ktp. ĉe ambaŭ seksoj, ekkresko de haregoj en brovoj ĉe viroj, kaj ĉeso de menstruo (menopaŭzo) ktp. ĉe virinoj (klimakterio).

LA SISTEMO DE LA SENTADO

La sistemo de la sentado konsistas el la haŭto kun ĝiaj apartenaĵoj, kaj la aparatoj por flarado, gustado, vidado, aŭdado kaj ekvilibro.

La haŭto — La haŭto funkcias ne nur kiel aparato de ĝeneralaj sentoj (tuŝo, premo, varmo, malvarmo kaj doloro), sed samtempe ankaŭ kiel protektilo de la korpo, forigilo de la superflua akvo, regulilo de la korpa temperaturo kaj fine kiel rezervejo de la graso. Brulvundo aŭ brogvundo eĉ malaltgrada rezultigas nepran morton de la vundito, kiam ĝi okupas pli ol trionon de la tuta haŭtsurfaco.

La haŭto konsistas el tri tavoloj: la epidermo, tavolita epitelio korniĝinta, la dermo, maldika tavolo de densa kunighisto, kaj la hipodermo, subhaŭta kunighisto, kiu entenas grason precipe multekvante ĉe infanoj kaj virinoj (panikulo).

La haŭtkoloro estas ĉefe kondiĉita de la sangokvanto en la dermo kaj la pigmentokvanto en la profunda tavolo de l'epidermo. Laŭ la haŭtkoloro oni klasifikas la homaron kutime en tri grandajn rasojn: blankan, nigran kaj flavan. Infanoj de la flava raso montras ĉe la lumbosakra regiono bluecan makulon de diversaj formoj kaj grandeco, konatan kiel mongola makulo, kaŭzita de pigmentoĉeloj en la dermo de la nomita regiono.

Sur la polmoj, plandoj kaj

fingroberoj oni trovas figurojn el delikataj linioj ĉefe paralelkurantaj, kiuj estas jurmedicinalaj utiligataj por identigi individuojn.


La *haroj*, karakterizaĵoj de "harbestoj", estas fadenformaj organoj de korniĝintaj epiteliĉeloj. Ĉe la homo ili estas reduktitaj ĝis la lanugo escepte de kelkaj korporegionoj (kaphararo, brovo, okulharoj k.a.); ĉe la pubereco ekkreskas la t.n. puberaj haroj (pubharoj, akselharoj, ĉe viroj krome barbo), kies biologia signifo ankoraŭ ne estas sufiĉe klarigita. En la maljuneco okazas elfalo kaj griziĝo de la kapharoj k.a. La formo kaj la koloro de la kapharoj estas laŭrase diversaj. La japanoj apartenas al raso, kiu posedas glatajn kaj malhele brunajn kapharojn. La haro estas enplantita en tubforman saketon de la haŭto, la harfoliklo, al kiu apartenas seboglando kaj fasko de glataj muskolfibrooj, stariganto aŭ arektoro de haro, kiu reflekse kuntiriĝas pro subita malvarmo aŭ pro timego kaj rezultigas "anseran haŭton" en pli-malpli vasta haŭtteritorio.

La *ungoj* konsistas ankaŭ el korniĝintaj epiteliĉeloj kaj kovras la dorsan surfacon de finfalangoj.

Al la *haŭtglandoj* oni apartigas du specojn. La seboglandoj ordinare akompanas harojn kaj produktas sebon. La ŝvitglandoj sekrecias ŝviton. En kelkaj regionoj, precipe en la akselo, troviĝas modifitaj ŝvitglandoj, kiuj ofte produktas sekreciaĵon kun speciala odoro kaj ŝajnas rilati al nia seksa vivo. La ŝvit-sekreĉiado okazas ĝenerale en alta temperaturo, en kelkaj haŭtregionoj (manplatoj kaj plandoj) tamen nur pro psika agitado (klopodo, maltrankvilo, timo k.a.).

La *mamoj* estas karakterizaĵo de "mamuloj". Ili faras ĉe virinoj fortan disvolviĝon post la pubereco kaj ekfunkcias post akuŝo. Ili posedas en la mezo la mamplaton (cico) ĉirkaŭitan de mamareolo kun dek kelkaj areolaj glandoj de Montgomery (rudimentaj laktoglandoj), kiuj fariĝas distingaj ĉe gravedo. La lakta glando konsistas el 15 — 20 lobojoj radie aranĝitaj, kiuj malfermas siajn duktojn unuope sur la mamplato.

La vidado — La aparato de la vidado konsistas el okulglobo



- 1 Korneo
- 2 Lenso
- 3 Konjunktivo
- 4 Okulmuskolo
- 5 Skleroto
- 6 Koroido
- 7 Retino
- 8 Opta papilo kun blinda punkto(+)
- 9 Opta nervo
- 10 Okulkamero kun akveca humoro
- 11 Iriso
- 12 Ciliaro
- 13 Okulmuskolo
- 14 Vitreo
- 15 Flava makulo kun centra foveo(○)

kun opta nervo kaj ĝiaj akcesoraj organoj: palpebroj, okulmuskoloj, larmoglando k.a.

La *okulglobo* kuŝas en la orbito kaj estas kunligita kun la cerbo per la opta nervo. Ĝi estas ofte komparata kun fotografa aparato kaj estas kunmetita de kapsulo kaj enhavo. La kapsulo konsistas el jenaj partoj: la korneo faras ĝian antaŭan diafanan parton, kaj la pligranda skleroto ĝian malantaŭan blankan. Brune pigmentita, angiorika membrano (uveo) tapetas la internan surfacon de la skleroto kaj estas dividita en antaŭa ringforma parto, la ciliara korpo aŭ ciliaro kaj pli granda malantaŭa, la koroido. La iriso estas diskoforma membrano kun la pupilo en la centro, kiu ŝanĝas reflekse sian grandecon responde al la heleco per glataj muskolfibrooj entenataj en la iriso. La retino faras la plej internan tavolon de la kapsulo kaj posedas tre komplikan strukturon. Ĝi estas ekscitebla per lumaj stimuloj, kaj ĝia ekscito estas kondukata per la opta nervo al la opta centro de la cerbo. Responde al la nervo la retino montras etan elstaradon, la opta papilo aŭ disko, kie mankas la opta sento (blinda punkto); flanke de la papilo la retino posedas flavan makulon kun centra foveo, loko de preciza vidado.

La enhavo de l'okulglobo konsistas el lenso, vitreca korpo (vitreo) kaj akveca humoro. La dukonvekso lenso aŭ kristalino

de epitelia deveno kuŝas malantaŭ la iriso; ĝi estas kunligita kun la ciliaro per multe da delikataj filamentoj, kaj ĝia konvekseco estas reflekse akomodata al la objekto videnda per glataj muskolfibrooj en la ciliaro. La vitreo aŭ hialoido estas gelateneca fluaĵo, kiu plenigas la spacon malantaŭ la lenso. La spaco inter la korneo kaj vitreo estas nomata okulkamero, dividita per la iriso en antaŭan kaj malantaŭan; ĝi estas plenigita de la lenso, kaj de l'akveca humoro, nomata ankaŭ kamerakvo. La lumradioj atingas tiamaniere la retinon tra la korneo, kamerakvo, lenso kaj vitreo, kaj per ilia reflektokapablo la objekto projekcias sian inversan bildon sur la retinon, kvazaŭ sur la filmon el fotografa aparato.

La *palpebroj*, supra kaj malsupra, estas haŭtfolioj, kiuj protektas la okulglobon de antaŭe. La malantaŭa surfaco de la palpebroj estas kovrita de mukozo-simila membrano, la konjunktivo, kiu faras konjunktivan sakon inter la palpebroj kaj okulglobo, kaj kovras la antaŭan surfacon de la skleroto ĝis la kornea rando.

La *larmoglando* situas sur la supra flanko de la okulglobo. Ĝia sekreciaĵo, la larmoj, enfluas unue en la konjunktivan sakon, malsekigas la antaŭan surfacon de l'okulglobo kaj estas ensuĉata en la larman sakon tra la larmaj duktoj supra kaj malsupra, kiuj komenciĝas apud


la interna okulangulo ĉe la palpebra rando. La larma sako troviĝas en la interna muro de l'orbito kaj malfermas sin malsupre tra la nazlarma dukto en la malsupran nazmeaton.

Aŭdado kaj ekvilibro — La aparato de l'aŭdado kaj ekvilibro estas kutime nomata orelo kaj estas dividata en tri partojn: ekstera, meza kaj interna oreloj.

La *ekstera orelo* konsistas el orelaŭriklo kaj ekstera akusta meato (kanalo). La orelaŭriklo estas haŭtfolio, kiu entenas kartilagon de komplika formo. Ĝia libera envolvita rando, la helikso, ofte montras tubereton de Darwin, kiu respondas al la orelopinto de bestoj. La orelobeto estas homo-speciala formaĵo. La akusta meato komenciĝas malantaŭ elstarado nomata trago, iras internan kaj atingas la timpanan membranon aŭ miringon, kiu limigas la meaton de la timpana kavo.

La *meza orelo*. La timpana kavo aŭ timpano estas malvasta pneŭmatika spaco en la temporalo. Ĝi komunikas sin antaŭe kun la faringo per la oreltubo (salpingo) de Eustachi malantaŭe kun la mastoidaj ĉeloj en la samnoma apofizo. En la timpana kavo troviĝas ĉeno de tri ostetoj: maleo, inkudo kaj stapedo, kun du muskoletoj el striitaj muskolfibrooj. La osta ĉeno peras inter la timpana membrano kaj la interna orelo, kaj reflekse kontrolas la streĉecon de la timpana membrano responde al la forteco kaj la alteco de tonoj. La timpana kavo kaj la mastoidaj ĉeloj entenas aeron, kaj la aeropremo ekster kaj en la timpana kavo estas egaligataj tra la oreltubo, kies faringa aperturo estas momente malfermata ĉe ĉiu engluta ago.

La *interna orelo* aŭ orellabirinto troviĝas interne de la temporalo. Ĝia osta kapsulo (osta labirinto) posedas meze vestiblon, malantaŭe tri duoncirklaĵajn kanalojn, antaŭan, malantaŭan kaj flankan, kaj antaŭe helikon. En la vestiblo troviĝas du saketoj, utriklo kaj saklo, en la duoncirklaĵajn kanalojn tri samnomaj duktoj kaj en la heliko helika dukto kun tri spiralturoj. Ili komunikas sin unu kun la alia kaj faras tiamaniere tre komplikan kaj delikatan duktosistemon, membrana labirinto plenigita de fluaĵo nomata



sian pozon aŭ movadon. La helika dukto portas sur sia muro la spiralan organon de Corti de epitelia deveno, kun tre komplika strukturo. Ĝi ricevas fibrojn de la helika nervo kaj funkcias kiel organo de aŭdado. La sonondoj de l'aero okazigas unue al la timpana membrano respondan svingadon, kiu estas transportata per la ĉeno de la timpanaj ostetoj al la perilimfo, kies svingado stimulas fine la organon de Corti kaj elvokas aŭdosen-ton respondan al la sonondoj. La sonondoj estas krome rekte kondukataj al la spirala organo tra la ostosubstanco.

Libere elektitaj paragrafoj el Nia korpo — Anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj, de Seiho Nishi. Eldonis Gunma Esperanto-Societo, Maebaŝi, Japanio

endolimfo. La spaco inter la osta kaj membrana labirintoj estas ankaŭ plenigita de alia fluaĵo, perilimfo. La utriklo, saklo kaj tri

duoncirklaĵaj duktoj ricevas branĉojn de la vestibla nervo kaj reflekse prizorgas la ekvilibron de la korpo, kiam la kapo ŝanĝas

1983-års stad är Budapest!

1983-års internationella esperantokongress kommer att äga rum i Budapest i Ungern. Det är klart att du ska vara med! Gör slag i saken redan i år — det tjänar du på! Den 1 januari kommer dessa avgifter att gälla:

1 Icke medlem i UEA	560 kr
2 Medlem med årsbok	495 kr
3 Medlem med årsbok och 'esperanto'	390 kr
4 Make/maka till 1.	395 kr
5 Make/maka till 2 eller 3	350 kr
6 Ungdom t o m 20 år	170 kr
7 Heltidsstuderande t o m 30 år	280 kr
8 Synskadad	225 kr

Beställ anmälningsblankett från Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040-91 63 09. Blanketten ska tillbaka till samma adress, ifylld.

Du betalar till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto.



TABULO

Manresa situas 70 km for de Barcelono, kaj tie troviĝas esperantoklubo, kiu ŝatus trovi korespondantojn-amikojn en Svedio. Skribu al Luis Soldevila Mominó, Serapio Farré 14 - 16, 3o 4o, Manresa, Hispanio.

Senpacienca pri korespondantoj ĉi tiu 21-jara iranano, kiu pretas korespondi pri amikeco inter popoloj ktp. Bahram Esmailian, Bonbast-e-chitra, No 99, Abiverd st., vahid-e-Dastgerdi (Zafar) st., Tehran 19198, Irano.

Ĉi tiu korespondemulo eklernis esperanton komence de 1982 kaj bezonas iom da helpo. Sed li progresas! Helpu lin progresi pli rapide. Mario Sandoval Solano, Carrera 80 - 8-B-13, Barrio Castilla, Bogotá, Kolombio.

47-jara kuracisto ĝojus povi korespondi kun svedaj gekolegoj. Dro Stanko Iliev, Bl. Padarevski A-p.k.-17, BG-7013 Ruse, Bulgario.

El Pollando serĉas korespondantojn Jerzy Wierzbicki, ul. Reja 7/3, PL-65-076 Zielona Gora. Li estas dudek ses jara konstruteknikisto, kiu tre interesigas pri turismo kaj ĉio kunligita kun ĝi.

Moderna arto, literaturo, muziko kaj fremdaj lingvoj estas la kampoj pri kiuj ŝatus korespondi tiu ĉi junulino 19-jara. Britta Bergmann, Schelwitzer Weg 39, Fach 1515, DDR-Altenburg.

Pri kantoj kaj dancoj, sed ankaŭ alio, kio proksimigas la homojn ŝatus korespondi Sennadij Motĉev, SU-326866 s. Novyje Kairy, Bereslavskij rajon, Hersonskaja obl., Sovetunio. Li bezonas bildkartojn, diskojn, insignojn por interesigi gelemantojn en sia lernejo pri esperanto.

Novfondita esperantoklubo "Malnovkastelo" deziras korespondi kun gesvedoj pri ĉiuj temoj kaj certe respondos al ĉiuj. "Malnovkastelo", H.-Georg Kaiser, Wentzelstr. 12, DDR-7400 Altenburg.

29-jara inĝeniero bezonas iom da koresponda helpo por ellerni esperanton. Li trovas, ke tio estas la plej efika maniero. Vi povas skribi al li pri sporto, tekniko, turismo, geografio, aŭ peti lin rakonti pri sia trijara filino. La adreso estas: Paulo Dabek, ul. Zielona 69 m. 60, PL-90-759 Łódź, Pollando.

Ĉu vi ŝatus korespondi kun irana tapiŝvendisto? Jen ununura okazo! Ahmad Nagizade, adreso Aeneh sazan Bazar, Saray-e-Mirzagali No 26, Tabriz, Irano, estas je via dispono. Li estas 22-jara kaj needziĝinta.

En Pakistano ekzistas nova esperanto-asocio, kiu havas membron 24-jaran, kiu nun serĉas korespondantojn en Svedio. Lia estas studento kaj lia adreso estas: Zulfikar Ali Fani, 649-D, G.M. Abad (Liakat Chok), Faisalabad, Pakistano. Vi rajtas libere skribi al li pri numismatiko, turismo, geografio, muziko, lingvistiko. Kaj se vi sendas al li ian Abba-ajon (ne fiŝskatolon!), vi faros lin feliĉa.

27-jara bulgara krupiero, kun interesigoj pri aŭtoturismo, muziko, sporto, certe respondos al viaj leteroj. Laĉezar Josifov Georgiev, poste restante, BG-1000 Sofia, Bulgario.

Ĉu ekzistas knabinoj, kiuj volus skribi al ĉi tiu 17-jara hungaro? Li diras, ke li ŝatus sporton kaj literaturon. Jen lia adreso: Pál Dajkó, Honnvéd út. 36 H-5126 Jaszfényzarv, Hungario.

30-jara, interesiganta pri historio, geografio, arto kaj numismatiko. Jen Ján Ilavský, Šrobárova 2668/27, bl. Odra, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio. Eble vi komencu per artbildkarto?

Li ŝas skribi leterojn kaj pretas korespondi pri temoj, kiuj interesas vin; sed precipe li ŝatus korespondi pri Svedio, ĉar li eĉ estas membro de la pol-sveda asocio. Jen okazo montri kion vi scias pri Svedio! Lia adreso estas: Feliks Zygański, ul. Leśna 14, PL-33-104 Tamow, Pollando.

Notu ĉi tiun nomon kaj adreson: Irena Miodińska, Kosciuszki 32/5, PL44-100 Gliwice, Pollando. Jen Irena prezentas sin mem: "Mi finis la ekonomian atlemejon, konas la francan kaj germanan lingvojn. Mi estas mezaĝa virino kun granda 13-persona familio: edzo, 3 gefiloj, 3 bogefiloj, 5 genepoj (2-7 jaraĵ). Mi ne plu laboras profesie, sed mi havas multe da interesigoj, mi multe legas, lernas kaj skribas". Por si kaj por sia esperantoklubo (300-membra!) ŝi serĉas korespondantojn. Ĉu ne iu klubo povus klube korespondi kun la klubo de Gliwice?

Ĉu vi ŝatus havi junan korespondamikonon en Novgorod? Tiam vi skribu al Tatjana. Ŝi estas dek ok jara studentino, kiu interesigas pri arto, literaturo, turismo kaj esperanto-movado. Ŝi ankaŭ kolektas bildkartojn kaj fotojn de verkistoj. Jen la adreso: Tatjana Nikitina, Kosmonavtov d. 10, ap. 44, SU-173016 Novgorod, Sovetunio.

Ing. Ján Ročkař, Kúpel'ná 4/I/13, CS-81102, Bratislava, ĈSSR, estas jam emerito, sed daŭre laboras en industria entrepreno. Kiel esperantisto li estas tamen relative juna. Ekkorespondu kun li!

Nicole Lagergren, Götgatan 75 C, II, S-116 62 Stockholm estas 12-jara kaj ŝatus danci baleton, teatron, bestojn kaj sporton. Ŝi ŝatus korespondi pri tiuj temoj kun samaĝuloj.

Se vi estas vere serioza filatelisto, jen korespondanto por vi: Karol Schikor, ul. 29 augusta 15/5, CS-97251 Handlová, Ĉeĥoslovakio.

ESPERANTO
FÖRSTÅS!

SEJU

Ungdomsfestival i Leuven, Belgien

Ett tiotal ungdomar från Sverige deltog i TEJOs (Internationella Esperantoundgomsförbundets) festival i Leuven i Belgien i somras. Officiellt kallades det kongress, men eftersom programmet mer liknade en festival, så kallar vi det så. Under en vecka kunde man lyssna på föredrag, dansa, vara med om utflykter (bland annat till ett ölbryggeri), lära känna nya människor och mycket annat. Nästa år kommer en liknande festival att äga rum i Debrecen i Ungern.

Kantante antaŭen i bredsand

I början av september samlades trettio esperantointresserade ungdomar i Bredsand utanför Enköping för den femte traditionella bredsandsträffen. Temat för träffen var övernaturligheter, vilket innebar att vi pratade om

handpåläggning, häxor och vättar, Swedenborg, grafologi, Anjara och naturligtvis en hel del om esperanto.

Träff i Farsta

I början av november träffades ett tjugotal unga esperantister på Farsta gård. Temana denna gång var bl a fasta, tårter och handarbete. Handarbete innebar att även unga män som inte rört nål och tråd sedan syslöjden i mellanstadiet sattes framför nål och tråd och förväntades prestera undersköna brodyrer. Nej, så långt gick inte kraven, men det fanns i alla fall möjlighet att få prova på olika stygn.

Förutom gäster från Italien och Norge hade vi nöjet att välkomna Hari från Indien som cyklat runt i Europa under två år.

Träff i Örebro 4 — 6 februari

Den som gärna vill träffa andra unga esperantister är välkommen till Örebro, även sådana som inte kan esperanto. Programmet kommer att bestå av många olika teman. Klart är att man kommer att syssla med amatörserier och esperantokurser. Träffen kommer att äga rum i G-gården, IOGT-NTOs lokaler, några minuters gångväg från centralen. Man ska ha sovsäck med sig. "La akridoj" den nya ungdomsklubben i Örebro ordnar madrasser till alla. Från kl 4 på fredagen är man välkommen.

115 kronor kostar det för SEJU-medlemmar att vara med, 140 för andra. Man måste betala i förväg, senast den 19 januari, till postgiro 58 04 53-9, La Akridoj, Örebro Ungdomsesperantister.



Japansk dans, vid ungdomsfestivalen i Leuven. Foto Karin Wetzel



Rock på esperanto. Här syns Michael Englund och Bertil Wennergren som framför "Kafo kaj te" vid ungdomsfestivalen i Leuven. Foto Karin Wetzel

Det är nu definitivt att nästa års kongress för SEF och svenska esperantister kommer att inträffa i Gävle och att det blir ett 4-dagars arrangemang med både SEF och SEJU.

Man räknar med att den längre kongressen och det rikare programmet kommer att locka en del utländska esperantister av både yngre och äldre slag.

Gävleklubben har en rik esperantohistoria att blicka tillbaka på, inte minst grundandet av denna tidning för exakt 70 år sedan. 1983 års esperantokongress kommer förhoppningsvis att ge klubben luft under vingarna.

Norsk-svenska träffen uppskattad även i år

Andra mötet i rad bland esperantister i Norge och Sverige ägde rum i Budor, strax öster om Hamar i Norge. Totalt deltog 47 personer, varav 15 från Sverige. Samvaron och kurserna blev uppskattade.

Styrelserna för norska och svenska esperantoförbund hade ett gemensamt möte i Budor och beslöt att permanenta den gemensamma mötesverksamheten med en gemensam träff vartannat år.

SEF-resor till kongressen

Det var ett tag sedan sist, men nu är det dags igen att ordna en SEF-resa till en kongress. Resmålet är Budapest förstås, och två alternativ finns att ta sig dit:

- Med buss och två veckors vistelse i Ungern. Klubbarna har tidigare fått tips om resan, men ännu finns platser kvar. Ring Kerstin Rohdin, 019-23 63 45 för information.

- Flyg tur och retur, avresa fredagen den 29 juli och återresa den 7 augusti. Två hotellalternativ: 1:a klass och turistklass. Om minst 10 personer är intresserade

kan hemresa förläggas till den 14 augusti.

Prisuppgift finns ännu inte, men kommer att meddelas i *La Espero* så fort som möjligt.

Esperanto 75-jara en Danlando

La danaj esperantistoj povos dum 1983 festi 75 jarojn de esperanto en Danlando, inter alie per komuna kongreso la 18an, 19an kaj 20an de marto 1983 en Kopenhago. La komuna komitato de kopenhagaj esperantistoj preparas la programon kaj invitas ankaŭ eksterlandajn esperantistojn al partopreno.

El la programo ni citas: interkona vespero en la vendredo, kun filmprezentado kaj junulara renkontiĝo. En la sabato solena inaŭguro, ĝeneralaj kunvenoj kaj festa vespero. En la dimanĉo antaŭtagmeza aranĝo kaj en la posttagmezo fino de la kongreso.

La programo estas ankoraŭ preparata, sed ĉiuj aliĝintoj ricevos ĝin en tempo. Informojn vi povas peti ĉe Komunkomitato de kopenhagaj esperantistoj, Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Semajnfino en Falköping

La okcidenta distrikto de SEF aranĝis kurson en la kurachejmo de Mösseberg la 27an kaj 28an de novembro. La celo de la kurso estis, ke oni lernu kaj praktiku la informadon kaj argumentadon pri esperanto.

La partoprenantoj prilaboris grupe kelkajn difinitajn taskojn, i.a. anoncadon, informadon pri novaj kursoj kaj kontaktojn de amaskomunikiloj.

Interesa tasko estis podia debato, kie du flankoj argumentis por kaj kontraŭ esperanto.

Sabatvespere la muziktrio Bergström-Mattsson-Sandelius el Skövde prezentis muzikan programon, kiu lau la aplaŭdoj

montriĝis tre ŝatata de la publiko.

Partoprenantoj venis el Falköping, Skövde, Tidaholm, Malmö kaj Göteborg.

Denove kurso en Falköping

Fine de marto okazos denove kurso en Falköping, pli ekzakte la tagojn 25a, 26a kaj 27a de marto. Laŭkutime Södra Vätterbyggdendens Folkhögskola funkcios kiel kursejo-loĝejo. La temoj de la kurso estos: retoriko, kio inkluzivos parolteknikon kaj voĉprizorgadon; ekzercado en tradukado; kurso por komenkantoj. Entute estos 16 — 18 kurshoroj. La kosto por la tuta aranĝo estas 360 kronoj, en dulita ĉambro. Pliajn informojn donas K. Buremo ĉe la esperantoklubo de Jönköping.

Forpasis dum 1982

En Gotenburgo forpasis **Allan Jönsson**, 68-jara. Li estis malnova kaj fidela esperantisto, kiu partoprenis al la kluba agado dum multaj jaroj.

En Helsingborg forpasis **Oskar Hedlund**. Li naskiĝis en 1901 kaj ankoraŭ partoprenis la lastan Universalan Kongreson en Antverpeno.

Ankaŭ la klubo de Kumla perdis fidelan membron, la 75-jaran **Herty Ström**. Ŝi fariĝis membro de la klubo en 1932 kaj fidele agadis, i a kiel gastiganto (Hugo Steiner, Julio Baghy, Josef Scherer kaj multaj aliaj estis gastoj ĉe ŝi) kaj plej laste kiel revizoro.





KORT & GOTT

BELGIEN. I La Paix, Erpent Namur, fungerar fr o m i höst esperantokurser för elever i femte klass. Man rapporterar att 40-% av samtliga elever i denna årskurs anmält sig till esperantokurserna.

BULGARIEN. Esperantokurser äger rum bl a vid Medicinska Högskolan i Varna och vid läroverk i Preslav och Sjumen.

KINA. Vid Yunnan universitetet finns kurser för studenter, tolkar och lärare i främmande språk.

VÄSTTYSKLAND. Vid universitetet i Paderborn leder dr A. Sakaguchi ett seminarium i interlingvistik med esperanto-kurs.

UNGERN. Vid katolska gymnasiet i Debrecen finns det flera kurser i esperanto: en för eleverna, en för resebyråanställda och en för dem som tänker ta statligt examen i esperanto.

NIGERIA. Esperanto undervisas vid Ekpoma-universitetet i Illeh.

BELGIEN. I Namur kommer i augusti 1983 den 10e internationella cybernetikkongressen att äga rum. För andra gången i rad kommer även esperanto att vara kongressens arbetspråk, vid sidan om engelska och franska.

SCHWEIZ. Framelec, som tillverkar armbandsur, marknadsför en modell under namnet "esperanto".

KINA. I september startade den andra kursen för högskolelärare i främmande språk.

BRASILIEN. Den första tidskriften på esperanto om fotboll har kommit ut i Porto Alegre, utgiven av den nya föreningen Internacia Esperanto-Klubo pri Futbalo.

TJECKOSLOVAKIEN. Den 23 oktober firade Esperantoklubben i Prag sitt 80-års jubileum med ett heldagsprogram. 250 deltog i firandet.



UPPTAKTSTRÄFF FÖR

FNS INTERNATIONELLA ÅR FÖR KOMMUNIKATION 1983

Språket. Människans viktigaste kommunikationsmedel.

Lördag 29 jan 1983 kl 14-17

Karlbergsvägen 32, Föreningshuset

(T Odenplan, uppgång Västmannagatan)

Inledning av:

Erik Ransemar, författare:

Kommunikation sett ur konstnärlig skapande synpunkt

Åke Sandin, ordf i Svenska Freds 1977-79, lärare:

Fred, u-land, språk

Christer Kiselman, professor:

Vad är ett världsspråk

Ingemar Nordin, rektor:

Esperanto och skolan

Utställning, bokbord och kaffeservering

Arr.: Esperantoförbundet tillsammans med lokala esperantoföreningarna

Anmälan senast 20 jan till

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

tel 08-11 74 34 (må-to 17-19, lö 10-12)